

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

Venu al ARE	1	Patkukoj	4
Esperanto por UN	2	Uropi	5
Reago al Esperanto por UN	2	Du opinioj pri la ciumado	8
Internacia jaro de la junularo	3	Jarkunsido de ESK	11

Aŭtune renkontiĝi en Esperantio

La jaroj pasas kaj ARE (Aŭtuna renkontiĝo de Esperanto) revenas... Se vi jam ĉeestis, vi scias ke temas pri interesa kaj amikeca semajnfino kun ĉeesto de kvindeko da esperantistoj el Kanado kaj Usono. Se vi neniam ĉeestis, pripensu veni en 2010. Ne timu se vi estas komencanto, vi havos la okazon plibonigi vian lingvan nivelon. La programo estas varia, bunta kaj la loko estas belega, apud lago ĉirkaŭita je montoj.

En 2010 la temo estos biodiverseco, lige al la samtema jaro deklarita de UNo. Por pliaj informoj kaj aliĝi : www.esperanto.qc.ca/are/eo

Bonvenon en Esperantio!

L'automne revient et ARE aussi!

La rencontre d'automne des espérantophones du nord-est de l'Amérique du Nord à Silver Bay, près du Lac George dans l'État de New-York, est maintenant une tradition bien ancrée. Programme varié, cours, conférences, jeux, excursions... il y a en pour tous les goûts. Une attention particulière est portée aux débutants pour qu'ils ne se sentent pas trop 'perdus'. L'année 2010 étant l'année de la biodiversité, nous aborderons ce thème de différentes façons durant la fin de semaine. Il est facile de s'inscrire sur le site web de la SQE. Nous vous rappelons que le passeport est maintenant obligatoire pour se rendre aux États-Unis.

Bienvenue en Espérantie!

Esperanta organizaĵo por UN ekfunkcias

En la UK en Havano estis anoncita la fondo de la organizaĵo Esperanto por UN, kiu laboros por altigi la profilon de Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj por disvastigi informojn pri UN inter la esperantistoj. UEA havas formalajn rilatojn kun UN kaj Unesko jam ekde la jaro 1954. Per sia oficejo en Novjorko, UEA flegas tiujn kontaktojn. Laborgrupoj en Parizo, Ĝenevo kaj Vieno faras similan laboron. De tempo al tempo UEA prezentas sian vidpunkton pri lingvaj demandoj en kunsidoj kaj konferencoj de UN kaj Unesko. UEA ankaŭ kaj mem organizas konferencojn kaj seminariojn en Ĝenevo, Novjorko, Parizo kaj aliloke por atentigi pri la valoro de Esperanto kiel neŭtrala komunikilo inter la homoj kaj pri la problemo de lingva malegaleco ĝenerale. La nova organizaĵo klopodos kreskigi subtenon por la laboro de UEA cxe UN kaj Unesko. Por sistema informado pri UN inter la esperantistoj ĝi lanĉos Esperantan retpaĝaron pri UN kaj Unesko. Ĝi argumentos por subtenado de UN per informado al la publiko pri ĝia valoro, instruado pri UN en la lernejoj, konsciigo pri la valoro de internacia ordo, kaj laboro por atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn. Detaloj pri membriĝo, retpaĝaro kaj agadplano de Esperanto por UN estos publikigitaj baldaŭ.

Fonto: Ret-Info

Kiam interesoj vendiĝas

Reago de Francisko Gauthier al la apuda artikolo



La parto kiu plej alkroĉas min estas “kaj por disvastigi informojn pri UN inter la esperantistoj”. Ekde jam dekoj da jaroj la Unuiĝintaj Nacioj rifuzas preni gravajn decidojn pri la disvastigo de Esperanto, ĉu paroli pri ili kaj iliaj celoj estas kondiĉo al tiu disvastigo? Ĉu la esperantistoj ankaŭ estas submetitaj al la politikaj emoj de la membroj de UEA? Tiu organizaĵo neniam havis engaĝiĝon por disvastigi, ekzemple, informojn pri *Amnestio Internacia*, aŭ alia, inter la esperantistoj, do kial ni devus lerni pli pri la Unuiĝintaj Nacioj kaj iliaj celoj?

Jes ja, UN estas ĉio-povanta, eble por tiu kialo la plej influaj esperantistoj deziras ke ĝi helpu nin ekde nun preskaŭ unu jarcento (ni enkalkulu ĝian antaŭulon, la LDN) sen konkreta efiko. Ĉu UN ne povas fari pli por Esperanto? Ne, ni ĉiuj scias ke UN estas organizaĵo kiu povas multe sed kiu fakte moviĝas nur kiam la naciaj interesoj de ĝiaj plej influaj landoj estas tuŝitaj. UN estas esence milita organizaĵo kreita post milito por konservi la interesojn de la venkintoj: ĉu estas ankoraŭ praveco por ke ĝiaj plej influaj membroj estu tiuj kiuj gajnis la duan mondmiliton? Ĉu la esperantistoj havas intereson en la plifortigo de tiuj nacioj, kaj ĉu esperantistoj ankaŭ fajfas aŭ devus fajfi pri kio ne plifortigas ilin, kiel la genocido en Ruando aŭ la masakro de la Tamiloj? Mi ne bezonas, en la esperantista medio, esti informita pri organizaĵo kun sango sur la manoj, dankon!

INTERNACIA JARO DE LA JUNULARO: ILIA JARO, ILIA VOĈO

Je la Internacia Junulara Tago la 12-an de aŭgusto 2010 komenciĝos la Internacia Jaro de la Junularo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. Diference de aliaj temaj jaroj ĝi do ne koincidas kun kalendara jaro. La Estraro de UEA decidis, ke la temo de la 96-a UK de Esperanto en Kopenhago (23-30 julio 2011) rilatos al la Jaro de la Junularo. Jen materialo de UN pri la celoj de la Jaro.

La Internacia Jaro de la Junularo, komenciĝante per la ĉiujara Junulara Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 12 aŭgusto 2010, festas kaj prilumas la gravecon de gejunuloj ĉirkaŭ la mondo. La kontribuoj de la junularo al la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC) estas fundamentaj por ilia sukceso, kaj Junularaj Konferencoj kunlabore kun Unuiĝintaj Nacioj respegulas la rolon, kiun gejunuloj ludas por la atingo de evoluo. La junularo estas la estonteco de UN kaj la estonteco de la tuta procedo de evoluo. Aranĝoj kunlige kun la jaro celas igi gejunulojn pli videblaj en la tagordo de internacia evoluigo.

Kun celo ekkapti la energion, imagopovon kaj iniciatemon de la monda junularo en venkado de la defioj, kiujn la homaro frontas, ekde fortigo de la paco ĝis progresigo de ekonomia evoluo, Unuiĝintaj Nacioj proklamis la Internacian Jaron de la Junularo, kiu komenciĝos je la Internacia Junulara Tago la 12-an de aŭgusto 2010, kun la temo "Dialogo kaj Reciproka Kompreno". La Ĝenerala Asembleo elektis tiun temon pro sia alta takso de la valoro de dialogo inter gejunuloj el diversaj kulturoj kaj homoj el diversaj generacioj.

"Gejunuloj konsistigas la plej gravan kapitalon en la monda historio por ŝanĝi la estontecon de la homaro", deklaris kunlaborantoj en la kampanjo de la Internacia Jaro de la Junularo.

"Okaze de la Internacia Junulara Tago, ni renovigu nian promeson subteni gejunulojn en ties evoluo", emfazis la Ĝenerala Sekretario Ban Ki-Moon en la Festado de la Junulara Tago en 2009. "Ili meritas nian plenan sindediĉon — aliron al edukado, adekvatajn sanservojn, dungajn eblecojn, financajn servojn kaj plenan partoprenon en la publika vivo", li diris.

Oni celas per la Jaro kuraĝigi gejunulojn sin dediĉi al subteno de progreso, inkluzive atingon de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj, kiuj celas plibonigi la vivojn de la tuta homaro per tranĉo de ekstrema malriĉeco kaj malsato, reduktado de patrino kaj infana mortado, plibonigo de aliro al edukado kaj sanservoj, kune kun aliaj pli specifaj celoj, ĝis la jaro 2015.

Junularo kaj la JEC

Patkuka renkontiĝo

Oscar Quijano



Dum la somero okazis kelkaj esceptaj renkontiĝoj. Unu el ili estis la sesan de aŭgusto ĉe *Le Triskel*, patkukejo laŭ la strato Saint-Denis. Kvin esperantistoj partoprenis, Suzane Bolduc, Jessy LaPointe, Kevin Masset, Francois Lorrain kaj mi.

Ĝuante bongustajn patkukojn, Suzano rakontis pri siaj spertoj en Kubo dum la Univerala Kongreso; Jessy, kiu ne estis partoprenanto en esperantaj aktivaĵoj de du jaroj, parolis pri la traduka laboro kiu estas lia ofico de kelkaj jaroj; Kevin kaj mi klarigis iomete nian laboron ĉe asekura firmao; kaj Francisko rakontis kelkajn interesajn faktojn kaj rakontojn pri la Esperanto-societo Kebekia.

Post la deserto, al ni ekplaĉis iri kafumi ie alie por daŭrigi la paroladon, do, post adiaŭo al Francisko kiu ne povis kuniri, ni komencis piediri ĝis iu kafejo; tamen, iel, ni finis sidante ĉe la trinkejo *L'amère à boire*, trinkante bonajn tiefaritajn bierojn. Menciinde estas ke Suzano iris al tiu sama trinkejo du jarojn antaŭe kun Jomo (la kantisto), kaj ke du aliaj esceptaj renkontiĝoj ĉi-somere okazis ankaŭ tie.

Paroladeto pri lingvoj sekvis, kiel kutime en esperantistaj kuniĝoj, kaj poste ni interŝanĝis bonhumorajn, interesajn rakontojn. Post kelkaj bieroj kaj ridoj ni adiaŭis kaj disiris, esperante alian, agrablan renkontiĝon, baldaŭ.



Uropi, moderna hindeŭropa lingvo

Silvano La Lacerto Auclair

L'auteur présente d'autres langues construites à vocation internationale. Aujourd'hui, un indo-européen moderne très bien pensé.



Esperantistoj ofte devas rebati la argumenton, ke Esperanto estas baze Eŭropa lingvo. Ni ofte respondas, ke tio estas eble prava je la vortara nivelo, sed ne je la gramatika. Aŭ ke Esperanto estas pli facile lernebla eĉ por Azianoj kaj Afrikanoj, pro ĝia simpleco. Aŭ ke, ĉiuokaze, ĉiuj aliaj eblaj konkurencaj lingvoj, unuarange la Angla, ankaŭ estas Eŭropaj, ĉu ne?

En la 80aj jaroj, Franca instruisto, Joël Landais, proponis novan lingvon por antaŭenigi unuecon en Eŭropo. Li nomis tiun lingvon Uropi, laŭ la tiama vorto por «Eŭropa» en tiu lingvo. Ĝi ne nepre prezentas sin kiel tutmondan lingvon, sed same aŭ pli bone ol la Angla povus ludi tiun rolon.

Mi trovas, ke Uropi estas tre bona lingvo. En multaj rilatoj, ĝi aspektas al mi **pli bona** ol Esperanto. Jes, jes! Ĝi ja havas malavantaĝojn, unue la preskaŭ totala manko de parolantoj, sed ĝi lingve estas tre bone kaj bele ellaborita.

Fakte, mi trovas, ke Uropi pli similas *naturan* lingvon ol Esperanto. Kvankam ĝi estas gramatike tre simpla, ĝi ne enhavas la skemismon, kiu karakterizas Esperanton. Esperantaj verboj, ekzemple, prezentas tiun sistemecon: *as, is, os; anta, inta, onta; ata, ita, ota*. Uropiaj verboj, kontraŭe, prezentas mankon de finaĵo en la prezenco, regulan finaĵon en la paseo kaj uzon de helpverbo por krei la futuron, kiel la Franca *Je vais faire* aŭ la Angla *I will do*.

La gramatiko de Uropi eĉ enhavas iujn, malmultajn, esceptojn. Ezemple, kvankam la finaĵo por krei ordajn nombrojn estas -i aŭ -j: *duj, trij, kweri, pini, sesi...*: dua, tria, kvara, kvina, sesa..., la vorto por «unua» estas *pri*; *uni* signifas «unika». Simile por frakcioj, inter kiuj la vorto por «duono» estas escepta: *mij, trit, kwert, pint...*

Simpleco kaj reguleco, do, sed ĉiam kun inspiro de veraj hindeŭropaj lingvoj, ne de pura logiko.

Vortaro

Se la gramatiko estas la ostaro de lingvo, ĝia karno estas la vortaro. Ankaŭ en tiu kampo, S-ro Landais tre bone laboris. Plej multaj Uropiaj bazaj vortoj estas **simplaj sed rekoneblaj** formoj de hindeŭropaj radikoj. La kreinto de Uropi simple sekvis la normalan evoluon de la hindeŭropaj lingvoj al pli granda simpleco. Tiel ni trovos: *kun* por hundo, *tab* por tablo, *man* por viro, *zina* (=ĵina) por virino (plej multaj inaj vortoj regule formiĝas per aldono de -a, krom kvin*), *has* por domo, *vest* por vestaĵo, *sol* por suno. Aŭ verboj: *voko* por paroli, *so* por esti, *vado* por piediri, *ito* por iri, *kluzo* por fermi, *sopo* por dormi. Aŭ adjektivoj kaj adverboj: *nar* por nigra, *bel* por bela, *spel* por rapide. Aŭ *bun* por bona **kaj** por bone... Malpli da gramatika sistemo ol en Esperanto, sed tamen facila lingvo. Tiel, oni diras *pos* por post, post kiam **kaj** poste; *berù* por malantaŭ **kaj** malantaŭe. Ni rimarku, ke, samfamilie kiel *pos*, oni trovas: *posen*: malfrua kaj *posni*: lasta. Simile, *ru-* estas adverbo/prefikso kiel la Esperanta *re-* (kun la senco inverse, ne duan fojon) kaj havas rilaton kun *ruk*: dorso.

Kompreneble, tute bonvenas internaciaj vortoj. Jen kelkaj, kies tradukon mi eĉ ne bezonos doni: *teatra*, *simfonij*, *taksi*, *burò*, *skol*,

wikènd, *centimeter*, *kilowàtt*. Aŭ ankaŭ *Swisia*, *India*, *Unizen State Ameriku* (USA), *Kanada*.



La flago de Uropi

Kiam mankis komuna hindeŭropa radiko aŭ internacia vorto, S-ro Landais decidis kunmiksi du aŭ tri radikojn, kreante vortojn facile rekoneblajn de pluraj lingvogrupoj. Ekzemploj estas: *santo* por kanti, *liamo* por ami, *fram* por amiko. Tiu sistemo ŝajnas al mi pli internaciiga ol tiu de Esperanto, t.e. elekti radikon el unu lingvo.

Granda avantaĝo de la Uropiaj vortoj super la Esperantaj estas ilia facila prononco. Mankas en Uropi tiaj sinsekvoj de konsonantoj kiel en **sankta**, **dekkvar** aŭ **ekscii**. Ĉar al tio aldoniĝas neregula akcento (nu, ĝi ja sekvas regulojn, sed ne ĉiam falas je la sama silabo), Uropi verŝajne estas pli belsona ol Esperanto.

Iom pli da gramatiko

Uropi ne havas akuzativon, sed fiksan vortordon (krom en poemoj). Ĝi tamen havas genitivon, markitan de -i aŭ -u (laŭ tio, ĉu la vorto finiĝas per konsonanto aŭ -a), -is kaj -us en pluralo. Pluralo de baza formo estiĝas kun aldono de -e aŭ de -s (laŭ la sama regu-

lo). Kvankam adjektivoj ne havas fiksan finaĵon, oni povas krei derivitan adjektivon, laŭ la sama formo kiel la genitivo: *mani* signifas «de viro» (post la nomo) aŭ «vira» (antaŭ la nomo). Kompreneble, adjektivoj ne akordiĝas. Ankaŭ adverboj simple formiĝas kaj finiĝas per *-am*, *-em*, *-im* aŭ *-um*.

Tiu genitiva formo ankaŭ utilas por formi kunmetitajn vortojn (same kiel en Volapük; amuze, ĉu ne?). Tiel, ni havas vortojn kiel *lucitòr*** (lumturo), *jasikrèm* (glacikremo, t.e. glaciaĵo) aŭ *campihàs*** (kampardomo). Ĉar en la gramatiko mankas rigideco, la finaĵo de l' genitivo povas malaperi, se necesas, ekzemple en *tezorisel*: trezorinsulo.

Sed la genieco de Uropi ĉefe videblas en la uzo de afiksoj. Se ni konsideras pli plurajn Esperantajn vortojn kiel *konkludi*, *ekskludi*, *kompari*, *prezidento*, *prioritato*, *respekto*, *komplico*, *traduki*, *evento*, *esprimi*, oni vidas uzon de Latinaj prefiksoj. Tiujn vortojn oni tamen devas unuope lerni. En Uropi, tiuj vortoj estas regule derivitaj kaj ofte rekoneblaj: *kokluzo*, *uskluzo*, *koeglo*, *prisedan*, *prirèg*, *ruspèk*, *koeldor*, *traduto*, *usvenad*, *uspreso*. Aparte impresis min la vorto *inkiden*: en-in-fan-ita: graveda. Mi ankaŭ ŝatis la uzon de la prefiso *-èl* (-ilo) post substantivoj, kiel en *horèl* (horilo, do horloĝo) aŭ *bustèl* (mamilo,

do mamzono). La manko de prefikso kiel la Esperanta *mal-* (ja ekzistas prefikso *an-*, sed ĝi pli signifas *ne-* aŭ *sen-*) estas larĝe kompensita.

Problemoj

Nu, ne ĉio estas perfekta en la reĝlando de Uropi. Mankas preskaŭ la tuta scienca vortaro. La kreinto de la lingvo tenas sian rajton mem krei novajn vortojn kaj mem diskonigi la informojn necesajn por bone lerni la lingvon; li foje pensigas al mi pri Schleyer, kreinto de Volapük. Sed ĉefe mankas parolantoj. Eble mankas spaco por nova internacia lingvo en la nuna mondo: realistoj lernas la Anglan, dum idealistoj lernas Esperanton (plus la Anglan...).

TTT-paĝaroj: <http://uropi.free.fr/index1.html> kaj <http://groups.google.com/group/uropi>

*Tiuj kvin paroj estas: *pater*, *mata*: *patr(in)o*; *frat*, *sesta*: *frat(in)*; *son*, *dota*: *fil(in)o*; *man*, *zina*: *vir(in)o*; kaj *bub*, *zika*: *knab(in)o*. Aldoniĝas *papa* kaj *mama*.

** La litero *c* estas prononcita ŝ.

DU opinioj pri la ciumado

Mi demandis al Silvano skribi pri la ciumado en lia lingva punkto. Li respondis al mi la sekvan tekston, kiu laŭ Francisko Lorrain ne diris sufiĉe, t.e. ke ĝi ne reprezentis ĉiujn opiniojn kiujn oni povas havi pri la ciumado. Ĉar li skribis alian interesan tekston por ekvilibrigi la aferon, ni povas vidi ĉi tie kiel oni povas malsame respondi al tiu ofta demando, tiu de la ekzisto de la pronomo *ci*.

Être à tu et à toi Sylvain Auclair



Certains se demandent parfois s'il est possible de tutoyer en espéranto. Eh bien, la réponse est non.

Théoriquement, il existe un pronom singulier de la deuxième personne: *ci*. Mais celui-ci n'a jamais été utilisé réellement. Dès le début de l'espéranto, les exigences d'une certaine politesse dans les relations entre personnes de nationalités et de langues différentes ont amené nos prédécesseurs à toujours se vouvoyer. Et, finalement, on s'en est très bien accommodé, ce qui a amené la mort de *ci*.

Certains traducteurs ont cependant eu recours à ce pronom pour rendre un usage familier (ou impoli) dans la langue source. Néanmoins, comme l'usage espéranto du *ci* n'a jamais vraiment été établi, un lecteur peut ne pas trop savoir comment interpréter ce *ci*. Après tout, en anglais, l'équivalent du *ci*, le *thou*, est dans les faits réservé pour s'adresser à Dieu! Par conséquent, il est préférable d'avoir recours à d'autres procédés pour rendre la familiarité ou le manque de respect que représente le tutoiement.

J'ai entendu dire que les membres de la *Sennacieca Asocio Tutmonda*, une association très à gauche, utilisaient le *ci*, un peu comme on peut utiliser le mot *camarade*. Malgré cela, presque tous les espérantistes utilisent toujours le *vi*. Pas besoin de truc linguistique pour savoir si on est amis ou pas.

Aldone pri “ci” Francisko Lorrain



Compléments sur le tutoiement en espéranto François Lorrain

Jen kelkaj pliaj informoj pri la uzado de *ci* en Esperanto. Veras, ke, en *niaj* renkontiĝoj, ni maloftege aŭdas tiun pronomon. Sed, fakte, ĝi estas pli uzata, ol oni pensus.

Mi aŭdis ĝin kelkfoje eĉ en Montrealo. Certe multaj anoj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) uzas ĝin, almenaŭ inter si.

Krom SAT, estas tuta skolo, kiu defendas ciumadon (tiom en literaturo, kiom en ĉiutaga Esperanta parolado), ĉirkaŭ la revuo *La Gazeto* kaj la ĉiujara IEK-renkontiĝo, kiuj miascie ne havas ligon kun SAT (IEK = Internaciaj Esperanto-Konferencoj). La revuon redaktas Eugène de Zilah, Madeleine de Zilah (antaŭnelonge forpasinta), kaj nun ankaŭ aliaj.

La konata verkisto Christian Declerck estas de tiu skolo. Li ĵus verkis romanon, *Spitaj — kiel hidrargo*, kiun mi ankoraŭ ne legis, laŭdatan de la recenzistoj, en kiu ciumado oftas.

Alia konata verkisto, ankaŭ de la *La-Gazet*-a skolo, Sen Rodin, Italo, rakontis (*La Gazeto*, marto 2010),

Voici quelques informations additionnelles sur la question. Il est vrai que, dans *nos* rencontres, nous entendons rarement *ci*. Mais ce pronom est en fait plus utilisé qu'on le penserait.

Je l'ai déjà entendu quelquefois à Montréal. Il est aussi connu que les membres de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) l'utilisent, au moins entre eux.

En dehors de SAT, il existe toute une école qui défend le tutoiement en espéranto (autant en littérature que dans la langue parlée), autour de la revue *La Gazeto* et de la rencontre annuelle IEK (Internaciaj Esperanto-Konferencoj), lesquelles, à ma connaissance, ne sont pas liées à SAT. Les rédacteurs de cette revue sont Eugène de Zilah, Madeleine de Zilah (décédée récemment), et maintenant aussi d'autres.

L'écrivain connu Christian Declerck appartient à cette école. Il vient de publier un roman, *Spitaj — kiel hidrargo* (*Récalcitrants — comme le mercure*), que je n'ai pas encore lu, qui est bien accueilli de la critique, et dans lequel le tutoiement est fréquent.

Un autre auteur connu, de la même école, Sen Rodin, un

ke en lia Esperanta medio, en Italujo, en la jaroj 40-aj kaj 50-aj, Esperantistoj ciumis aŭ viumis laŭ la cirkonstancoj, pli-malpli kiel oni kutime faras en la itala. Mi subkomprenis, ke, tamen, nuntempe tiu ciumado preskaŭ malaperis en la tiea Esperanta medio.

Pierre Delaire, unu el la gravaj Esperantistoj de la 20^a jarcento, tradukinto de *La Eta Princo*, sisteme uzis la pronomon *ci* en la unua eldono (1961) de lia traduko. La kvanto da *tu*-oj en la originalo estas tiom granda, tamen, ke lia traduko, plene je *ci*-oj, iom strange impresas. Por la dua eldono (1984), li decidis uzi la pli kutiman *vi*-on, kaj elektis aliajn manierojn doni infanecan koloron al la diroj de la eta princo. Ekzemple, dum en la unua eldono (kun *ci*) Delaire ĉiam tradukis la francan vorton *mouton* per *ŝafo*, en la dua (kun *vi*) li plej ofte tradukis ĝin per *ŝafeto*, en la eldiroj de la princeto.

En la lasta, tria, Esperanta eldono de la libro, ĵus aperinta, la revizia komitato respektis tiun elekton de Delaire, eĉ iomete aldonante al tiuj *aliaj manieroj* — ekzemple, foje enŝovante la vorton *sinjoro*, kiam la eta princo diras *vous* en la originalo.

Certe ciumado en Esperanto estas minoritata — kaj iomete pli minoritata en vivaj interŝanĝoj ol en literaturo. Sed ĝi ne estas morta, kaj oni daŭre debatas pri ĝi. Multe dependas de tio, kion oni legas, kaj de la specifaj Esperantaj medioj, al kiuj oni rilatas.

Italien, raconte (*La Gazeto*, mars 2010), que dans le milieu espérantiste où il a évolué, en Italie, dans les années 40 et 50, les gens se tutoyaient ou vouvoyaient selon les circonstances, plus ou moins comme on le fait habituellement en italien. J'ai cru comprendre, toutefois, que, à l'heure actuelle, ce tutoiement n'a plus guère cours dans ce milieu.

Pierre Delaire, un des espérantistes importants du 20^e siècle, traducteur du *Petit Prince*, a systématiquement utilisé le pronom *ci* dans la 1^{ère} édition (1961) de sa traduction. Mais le tutoiement est si omniprésent dans l'original que sa traduction, débordante de *ci*, laisse une impression un peu étrange. Dans la 2^e édition (1984), il a décidé d'utiliser partout *vi*, plus habituel en espéranto, et a recouru à d'autres moyens pour donner une couleur enfantine au propos du petit prince. Par exemple, alors que dans la 1^{ère} édition (avec *ci*) Delaire traduisait toujours le mot *mouton* par *ŝafo*, dans la 2^e (avec *vi*) il le traduit le plus souvent par *ŝafeto* (*petit mouton*), dans les propos du petit prince.

Dans la 3^e édition espéranto du livre, parue cet été, le comité de révision a respecté ce choix de Delaire, poussant même plus loin que lui ces « autres moyens » — par exemple, en ajoutant parfois le mot *sinjoro*, quand le petit prince vouvoie dans l'original.

Le tutoiement en espéranto est certes minoritaire — et plus minoritaire dans la langue parlée que dans la littérature. Mais il n'est pas mort, et il suscite encore des discussions. Tout dépend de ce qu'on lit, et des milieux espérantistes particuliers, que l'on fréquente !

La historio de la pronomo *ci* estas interesa. Mi simple citu Vikipedion:

«*Ci* tamen ne ekzistis en la komenco en Esperanto (en la Unua Libro ĝi tute ne aperis, kaj en la Fundamento ĝi ne menciigas en la 16 reguloj). En la unuaj tempoj *ci* entute ne estis uzata. Zamenhof enkondukis la pronomon *ci* kiel rimedon redoni en tradukoj diversajn alilingvajn unu-nombrajn duapersonajn pronomojn.»

Estas ja fakto, ke neniam establiĝis en Esperanto klara normo rilate ciumadon. Oni ciumas en multaj lingvoj, sed la sociaj cirkonstancoj de tiu ciumado povas ege varii de kulturo al kulturo. La ekzemplo de la nuntempa angla, substrekitaj de Silvano, frapas. En Esperantujo ekzistas kelkaj medioj, relative malgrandaj, en kiuj, mi supozas, ia normo establiĝis, sed ĝi eble ne estas entute la sama en ĉiuj tiuj medioj. Ĝenerale, en Esperantujo, la cirkonstancoj, en kiuj oni povus ciumi, ja ne tute klaras.

L'histoire du pronom *ci* est intéressante. Permettez-moi de simplement traduire ce qu'en dit la Vikipedio :

«Au début, toutefois, *ci* n'existait pas en espéranto (dans le Premier livre il n'apparaissait pas du tout, et dans le Fundamento il n'est pas mentionné dans les 16 règles). Dans les premiers temps *ci* n'était pas du tout utilisé. Zamenhof l'a introduit pour permettre de traduire les pronoms de la deuxième personne du singulier qui existent dans diverses langues.»

C'est un fait qu'il ne s'est jamais établi, en espéranto, de norme claire relative au tutoiement. On tutoie dans de nombreuses langues, mais les circonstances sociales de ce tutoiement varient énormément d'une culture à l'autre. L'exemple de l'anglais contemporain, souligné par Sylvain, est frappant. Il existe quelques milieux espérantistes, relativement restreints, dans lesquels s'est établie, je suppose, une certaine norme, mais celle-ci n'est peut-être pas tout à fait la même partout. De manière générale, en espéranto, les circonstances dans lesquelles on pourrait tutoyer ne sont pas tout à fait claires.

Jarkunsido de ESK

La venontan monatan kunvenon de la Montrealaj Esperantistoj anstataŭos speciala kunsido, vendredon 24-an de septembro en la Restoracio Le Commensal (serĉu nin en fermita ĉambro ĉe la malsupra etaĝo).

Vespermanĝo je la 18 h

Ekde la 19 h : jarkunsido de la Esperanto-societo kebekia.

Le Commensal: 1720, rue Saint-Denis, metroo Berri-UQÀM.

Assemblée générale de la SQE

La prochaine rencontre mensuelle des espérantistes montréalais sera remplacée par une réunion spéciale, ce vendredi 24 septembre, au restaurant Le Commensal (cherchez-nous dans une salle fermée au sous-sol).

Souper dès 18 h 00.

Dès 19 h 00 : assemblée générale annuelle de la Société québécoise d'espéranto.

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

<i>Tago</i>	<i>Dato</i>	<i>Horo</i>	<i>Loko</i>	<i>Ĉe la menuo..</i>
Vendredo	24-a de septembro 2010	18 h	Commensal	Jarkunsido de ESK
Vendredo	29-a de oktobro 2010	19 h 30	MEDO	Babilado pri infanrakontoj
Vendredo	26-a de novembro 2010	18 h	MEDO	Ĉina komuna vespermanĝo
Sabato	11-a de decembro 2010	18 h	Commensal	151-a datreveno de L.L. Zamenhof

La manĝoj en MEDO estas bona ebleco gustumi ion novan. Se vi planas veni, ni petas ke vi pretigu aŭ aĉetu ion laŭ la vespera temo. Necesas anonci vian alvenon kelkajn tagojn antaŭe, se vi volas partopreni: info@esperanto.qc.ca.

Samtempe informu nin pri tio, kion vi planas kunporti. Vi povas ankaŭ alporti tipan trinkaĵon. Atentu ke temas pri bufedeca manĝo. Eblos varmigi manĝojn forne aŭ

mikroondforne. Pensu ankaŭ pretigi ion pri la temo por la vespera babilado. Kompreneble se vi ne deziras kunmanĝi, vi estas bonvena je 19 h 30.

Si vous désirez participer aux repas communautaires thématiques, vous devez apporter un mets. Vous devez également confirmer votre présence quelques jours avant, en mentionnant le nom du plat. Si vous ne désirez pas participer au repas, vous êtes le bienvenu à partir de 19 h 30.

Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

9-11 ^a de oktobro 2010	17 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
21-23 ^a majo 2011	8 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
19-21 ^a majo 2012	9 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio



Esperanto-Societo Kebekia
Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro: marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafikoj: Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Martin Benoît (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono / Échéance
pour le prochain numéro: 2010.11.20

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme: Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE: Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Martin Benoît (conseiller).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à:
riverego@esperanto.qc.ca

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)
(Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement

Service de librairie postale à Montréal
La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.

Service de librairie postale à Montréal
Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

www.esperanto.qc.ca/katalogo